

HEKIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORO:
S-RO MIGUEL A. ALTUNA

N.º 94
Maj-Jun. 1975

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



Jen FREDERICIA, la urbo kiu pace akceptos la IJK-anojn.



◦ E ◦ N ◦ H ◦ A ◦ V ◦ O ◦

HEJS-aferoj.....	1
"Verda" koro.....	2
IJK-75, Fredericia.....	3-4-5
Vi jam povas elekti.....	6-7
Enlandaj aktivuloj.....	7
Sukcesa provo.....	8-9-10
Ivo Lapenna: unuecdl-12-13-14	
7ª Franca-Hisp. Renkont.....	15
Poezia Paĝo.....	16

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

HEJS-AFEROJ

Dum tiuj ĉi monatoj, nia sekcio iomete antaŭeniris. Ne nur pro la okazigo de la Iª HEJS-tendaro, pri kiu ni raportas en la internaj paĝoj, sed ankaŭ ni atingis ian internacian prestiĝon per la apero en la aprila numero de "Esperanto" de laŭda mencio de nia bulteno pro ĝia regula aperado kaj interesa enhavo. El tiu ĉi paĝo, ni dankas al la redaktoro de la oficiala organo de UEA lian afablecon.

La tendaro ne nur postlasis agrablan impreson, sed ankaŭ ekonomian profiton, kiu utilos por iom kovri niam deficiton. Tamen, parton ni dediĉos al helpo por la pluvivo de "Kontakto". Ni pagos 5 abonojn al Kontakto por la pasinta jaro. Tiuj ĉi abonoj favoros esperantistajn hispanparolantojn. El tiu ĉi paĝo ni vokas la interesitojn (vi mem povas esti unu).

Finfine, post pli ol 6 monatoj, HEF respondis niajn plurajn leterojn. Krome, jam estas aprobita de HEF-estraro nia Regularo, kun unu sola amendo. Ni klopodos eldoni kopiojn de ĝi por disdoni al vi ĉiuj.

HISPANA KONGRESO

La XXXVª Hispana Kongreso de Esperanto okazos de la 18ª ĝis la 22ª de julio en Lérida. Se vi ne povos ĉeesti la IJK-on, renkontu tie vian enlandan samideanaron.

‘VERDA’ KORO

En la daŭro de nur 3 semajnoj, 2 esperantlingvaj geedziĝoj okazis en nia lando.

La unua, en Villalba (Madrid), la 24-an de aprilo. La geedziĝantoj estis nia samideano Enrique Pérez Estévez, Prezidanto de la Madrida Fervojista Asocio, kaj la bela Fino Nieves. Esperante celebris P. Jonás, el Valladolido. La feston ĉeestis multaj esperantistoj el diversaj partoj de Hispanujo, en tre gaja kaj agrabla etoso. La geedziĝintoj "mielvojaĝis" al Brazilo por poste viziti Italujon.

La dua tia evento okazis en Bilbao, la 7-an de majo. Temis pri nia antaŭa sekretariino, M^o José Morán, kaj la nederlanda samideano Roelof Spoelder. La geedziĝanto estis P. Adrián Zulueta, el Loyola. Kompreneble, la ceremonio estis esperante celebrita, ĉar fakte estas tiu la unika lingvo en kiu la novaj geedzoj povas interkompreniĝi. Feliĉe, la Bilbao'a Grupo sukcesis elprofiti la ŝancon, tiel ke la loka radio, gazetaro kaj televido raportis pri ĝi. La geedza paro reveturis kelkajn tagojn poste al la Psikiatria Klinikon de Wil (Svisujo), kie ili laboras, uzante esperanton kiel laborlingvon.

Kompreneble, ni deziras al ambaŭ novaj paroĝ la plej feliĉan kaj prosperan kunvivadon.

(Red.)

JUNULARA RESTADEJO

Denove, dum la venonta somero, la "JUNULARA RESTADEJO" de Monistrol de Montserrat (Barcelono), estos malfermita por ĉiuj esperantistoj ĉiutage dum la monato aŭgusto. Ni klarigas ke finfine oni konkludis ĝian konstruadon. En ĝi oni trovos elektran instaladon kaj banejon kies mezuroj: 65x33x18 m.

Nur restas diri ke ni atendas vian ĉeeston. Bonvolu rezervi anticipe ĉe S-ro. S. Aragay, Bassegoda 40-3-1^a, Barcelono. Tno. 333.80.81. Dankon!

ijk 75 fredericia

La urbo de la nunjara Internacia Junulara Konferenco (IJK) de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estas Fredericia, la plej grava punkto de la danaj fervojoj, kies situo estas tre oportuna rilate facilan alvenon (sed, certe, la foriro estos ploriga afero al la plimulto!) de la partoprenantoj.

Fredericia estas fondita, post reĝa ordono, en la jaro 1650. Tiam la urbo funkciis kiel fortikaĵo, de kie la reĝo povis kontroli la ĉefan transirejon inter Jutlando kaj la insulo Fueno. Ĝin utilis ne nur danaj soldatoj, sed foje ankaŭ malamikaj armeoj. De 1910 la fortikaĵo ne plu plenumas militan signifon. Anstataŭe ĝi nun servas kiel ŝatata ripozloko -ankaŭ taŭga por nokta promenado- de la urbanoj.

Nun Fredericia estas moderna urbo kun 44.000 loĝantoj, el kiuj multaj loĝas ekster la malnovaj remparoj. Sed pluraj trajtoj de la urbo memorigas la historiajn okazaĵojn. Pro defendaj kaŭzoj ĝiaj preĝejoj ne havas turon. Kutime oni renkontas tiajn preĝejojn nur en la plej malriĉaj partoj de nia lando. Nomoj de enmigrintaj judoj kaj francaj hugonotoj, kiuj dum periodoj ĝuis specialajn privilegiojn en Fredericia, estas portataj de multaj ĝiaj loĝantoj. Danke al tiuj enmigrintoj Danlando ricevis novajn ideojn, metodojn, produktojn kaj kulturplantojn, kio havis signifon ne nur en Fredericia, sed egale en la tuta lando.

La urbo logis konsiderindajn industriajn entreprenojn: fabriko por vitriolo kaj fosfatasterko, oleorafinejo krom multaj malpli grandaj uzinoj kaj fabrikoj. La granda, profundigita, haveno funkcias kiel grava importa centro, tra kiu venas oleo kaj karbo. Ĉiujaraj foiroj kaj ekspozicioj kontribuas al la famo de Fredericia kiel komerca urbo.

Apud Fredericia situas la du pontoj, kiuj kun-



igas Jutlandon kaj Fuenon -trans la Malgranda Belto. La malnova ponto servas precipe al trajnoj, dum la nova estas konstruita por aŭtoj. La du pontoj konsistigas eksterordinare belan vidaĵon en harmonio kun la naturo.

La konferencon organizas Dana Esperanto-Junularo (DEJ), tute nova organizo kiu ekzistas nur antaŭ tri jaroj. Tial ankaŭ ĝiaj gvidantoj kaj membroj estas junaj. Dum la 3 jaroj de ekzisto la organizo multe evoluis, kaj konstante kreskas la aktivadoj: regulaj

semajnfinaĵoj, informado pri ebloj kiujn prezentas Esperanto al gejunuloj, organizado de instruado de Esperanto. DEJ havis en 1974 35 aktivajn membrojn (28 en 1973). Ĝi certigis ke la membronombro de 1975 estos super tiu de la pasinta jaro, sed je kiom? -tion diri nature ankoraŭ ne eblas. La daŭra sukceso de DEJ kaj ĝenerale la interesiĝo pri Esperanto inter gejunuloj en Danlando estas en la nuna situacio altgrade dependa de la efikoj de la IJK. Ĝi prezentas al ili unikajn eblojn. La ĝisnuna glata aranĝado kaj tre kontentiga aliĝado donas al ili bonajn esperojn rilate IJK-on, kiu tenas en si tiom da perspektivoj por la plua agado en Danlando.

Inter la novaj konstruaĵoj de la urbo troviĝas ankaŭ Fredericia-hallen, kiu dum IJK 75 servos kiel kongresejo kaj laborejo al la partoprenantoj, vespere kiel distrejo kaj amuzejo. Tute proksime vi trovos Allé-skolen, kie loĝos la gejunuloj dum la kongresa semajno. Por kompletigi la liston pri utilaj faktoj: ĉiuj manĝoj okazos en la restoracio de Fredericia-hallen. Do, ĉio troviĝas en unu loko.

La temo de IJK 75 estas "Kultura intersaĝo". Sed, kion diri pri la programo? La Landa Konferenca Komitato (LKK) antaŭvidas la alvenadon de la partoprenantoj antaŭtagmeze kaj posttagmeze la 19-an de julio. Post vespera tagmanĝo startos la programo per Interkona Balo. Dimanĉe estos enkondukoj pri la diversaj laborgrupoj, kiuj funkcios dum IJK, kaj en malgrandaj grupoj kun esperanto-parolantaj gvidantoj vizito kaj konatiĝo kun la urbo. Dum la kongreso estos abunda distra programo. Krom la baloj kaj neoficialaj dancadoj laŭ magnetofona muziko estas planataj jenaj vesperaj aranĝoj: "vespero de malmulte konataj kulturoj", "vespero de dana kanto, muziko, danco". En la lasta tago de la kongreso, vendredo, okazos la IJK-balo. Post matenmanĝo en la sabato la partoprenantoj kun bedaŭro devas forvojaĝi, se ili ne intencas pli longe resti en Danlando.

Al la apartaj trajtoj de IJK 75 apartenas nia emfazo de popolkulturoj el malsamaj landoj, kio inkluzivas kantadon, dancadon, muzikadon kaj teoriaran pritrakton en laborgrupoj. Ĝis nun konkrete fariĝis unu laborgrupo, nome pri la kultura intersaĝo inter danoj kaj germanoj en la landolimaj regionoj. Pliaj grupoj nun organiziĝas. Estos lernado de poldancoj en grupoj, kaj LKK celas ebligi al ĉiu la partoprenon en tiu lernado. Ĝi certe estos kaj instrua kaj interkonatiga kaj vere amuza al la IJK-anoj! Unu grupo okupiĝos pri lernado de kantoj kun la celo novigi la kantan repertuaron inter esperanto-parolantaj gejunuloj. La LKK ankaŭ planas la eldonon de speciala kantolibro je favora prezo.

La favorajn kondiĉojn kaj taŭgajn ejojn de IJK 75 la LKK atingis nur per la helpo kaj konstanta kunlaboremo de la Turisma Oficejo kaj la urbaj instancoj de Fredericia. Varman dankon al ili!

Nu, nia nunjara rendevuo estos en Fredericia, Danlando, de la 19-a ĝis la 26-a de julio. Pliaj informoj riceveblaj de HEJS aŭ rekte de: 3la Internacia Junulara Konferenco, Østergade 43, DK-7430 Ikast.

(Ni speciale dankas ricevitaĵajn informojn al LKK-anoj Leif KRISTENSEN kaj Christian LAURIDSEN).

VI JAM POVAS ELEKTI VIAJN IDOJN

Jes, vi jam povas elekti vian idaron. Sur mia skribotablo troviĝas eltranĉaĵo de Barcelona ĵurnalo en kiu oni eksplikas la eblecon havi filon aŭ filinon; interesa, ĉu ne? La proceso ne estas tiel malfacila, kiel eble vi supozas. Tio nur dependas de la nazo de via edzo aŭ, male, de tiu de via edzino.

Legu atente: Edzo kaj edzino, kiuj havas larĝan nazon, havas 75 procentojn da eblecoj fariĝi gepatroj de inoj, kaj 25 procentojn alvenigi en ĉi tiun mondon virojn; la samo okazas en geedza paro, se li havas mallarĝan nazon kaj ŝi larĝan. Tamen, viro kun nazo normala, ordinara, kaj virino de larĝa aŭ mallarĝa nazo havas 75 procentojn da eblecoj havi idojn masklajn.

Verŝajne, tiu eltrovo de la modrina medicino ne estas grava. Nur rideton ĝi aperigis en miaj lipoj. Sed, vi imagu!, mi tuj rapidis meti min antaŭ spegulo por konstati, ĉu mia nazo estas larĝa aŭ mallarĝa aŭ de meza mezuro. Poste, kompreneble mi ankaŭ devis konstati al kia "larĝeco" apartenas tiu de mia edzino por kontroli ĉu tiu malkovro de la medicino pravas aŭ ne.

La alero povas esti transcenda en la rilatoj de la homoj. Vi ja scias, ke estas patroj, kiuj preferas filojn kaj ne filinojn, aŭ inverse, patrininoj, kiuj deziras filinojn kaj ne filojn.

Ĝis nun, ĉiu elektis sian dumvivan kamarad(in)on laŭ konsilo de sia koro (ne, la mono ne intervenas en ĉi tiu decido). La nazo havis neniam influon. Aparte de la nazo de Kleopatra mi ne scias ĉu la historio rakontas ion pri faktoj en kiuj la nazo estis la ĉefa rolanto de iu socia evento. Ekde nun ĉio povos ŝanĝiĝi. Kion oni preferos, ĉu larĝajn aŭ mallarĝajn nazojn?

Vi ofte legas anoncetojn, en kiuj oni petas eziĝproponojn. Neniam oni menciis ion rilate al la nazo. Sed nun, post tiu malkovro, vi ne surpriziĝu se iam vi legas anoncon kun simila teksto al

Ĉi tiu: Junulo, kun universitataj studoj, en bona ekonomia situacio, serĉas fraŭlinon cele al geedziĝo; ne gravas ŝia kulturo aŭ posedaĵoj, sed nepre ŝi devas havi larĝan nazon.

Grava problemo prezentigas al la gefraŭloj. Antaŭe la problemo de la idaro estis tasko de la naturo; hodiaŭ tio estas klara. Vi ne plendu poste se vi havas dek filinojn kaj neniun filon aŭ male dek filojn kaj neniun filinon, la kulpo estas nur via, ĉar vi ne sciis elekti la konvenan edz(in)on, kun la konvena nazo.

Eble la homaro povus dividiĝi en du partojn, tiun de la nazlarguloj kaj tiun de la nazmallarguloj; kiu scias, ofte la homoj estas (vi jam scias tion) tiel stultaj!

Por ni, kiuj jam falis en la reton de la eterna amo, ne gravas tio pri la naza largeco, nia vivo devas daŭri kun larĝa aŭ mallarĝa nazo, ni nur rajtas havi "larĝan" aŭ mallarĝan mienon.

Vi jam komprenas, ke pri tiu ĉi temo oni povas -large-skribi, sed mi opinias ke tio supre dirita jam sufiĉas, cetero mi vin konsideras sufiĉe inteligentaj por eltiri konkludojn.

— Luis Serrano Pérez (Sabadell) —

ENLANDAJ AKTIVULOJ

La vigla junulara sekcio de Sabadell (JESS), jam la trian fojon organizos Junularan Esperantistan Renkontiĝon. Ĝi okazos en Calafell la 25-26-an de oktobro. Programon kaj aliĝilon vi povas mendi ĉe ni, aŭ ĉe JESS-Centro Esperanto Sabadell, Apdo 407, Sabadell.

Gojiga novaĵo estas la revigliĝo de la barcelonanoj, membroj de la esperanta fako de Klubo de Amikoj de UNESKO, Fomento Martinense kaj Stelo de Paco, kunvenintaj en tiu ĉi lasta kun sabadellanoj la 27-an de aprilo. Entute, ili estis pli ol 30. Decidoj estis la jenaj: a) Arta festivalo en Sabadell la 8-an de junio b) Arangi naĉian enketon pri lingvaj malfacilaĵoj dum internaciaj kontaktoj c) Reorganizi la HEJS-Barcelono-Delegacion d) Organizati amasan ĉeestadon al la XXXV^a Hispana Kongreso de Esperanto en Lerido.

SUKCESA PROVO



I^a HEJS-TENDARO

De la 27^a ĝis la 30^a de marto, kvindeko da "verdaj" junaj kuraĝuloj renkontiĝis en la aragona ĉefurbo, Zaragoza, por partopreni la 1-an HEJS-tendaron.

La unua rimarkinda fakto en tiu ĉi aranĝo, feliĉe, estas la granda nombro de partoprenintoj, kiuj de disaj lokoj el nia lando alveturis la tendaron.

La programo, kiu, per tio legebla en la aliĝiloj, ŝajnis ekzisti, fakte fariĝis nevidebla, ĉar preskaŭ neniu el la projektitaj programeroj povis okazi.

Komenciĝis la tendaro la 27-an, ĵaŭdon, vespere post la vespermanĝo. Post la prezento al la partoprenantoj de la ĉeestantaj delegitoj kaj estraranoj, la unika kaj tre grava afero tiam diskutita estis la partopreno en la sekvantaga ekskurso al "Monasterio de Piedra". Ŝajnas, ke preskaŭ neniu supozis ke tiu ekskurso kaj koncerna tagmanĝo estis pagencaj. La prezo de la tuta afero ŝajnis tro kosta al la plimulto, tiel ke komence nur 16 pretis partopreni. Sed estis jam tro malfrue por malmendi la aŭtobuson, kaj, tiukaze, la deficito iĝus terure granda. Post konsciigo de la homoj, finfine oni sukcesis ke 45 el ili ekskursis. Ni tre devas bedaŭri ke nia tendaro komenciĝis per tia akra diskutado.

La vendredon, kiel programite, do, okazis la ekskurso, kiu, malgraŭ ĉio, estis la plej bona aranĝo el la tendaro, ĉar ĝi celis, kaj iel atingis, kunigi la homojn en iu ejo: la aŭtobuso. Dum tiu ĉi veturado oni disdonis la hispanan kantareton ĵus eldonitan de ni, tiel ke ni kantis la ĉiamajn ekskursajn kanzonojn, sed en la Internacia Lingvo Cetere, estas belega la pejzaĝo videbla ĉe "Monasterio de Piedra", kaj ni pasigis tre agrablajn horojn admirante la tieajn akvofalojn. Poste, ni alveturis la manĝejon, kie ne tre bone pretigita

manĝaĵo momente satigis nin. Dum la revenveturado, ni haltis ĉe diglago, kaj poste en Calatayud. Tie, la delegitoj kaj estraro havis kunsidon por pretigi la ĝeneralan kunsidon.

Reveninte en Zaragoza, la projektita kampfajro ne okazis, pro neeblo. Tial, post vespermanĝo, ni vage trapasis la urbon, por fine halti en la stacia trinkejo. Cetere, ne estis tre agrable reniri la kampadejon por dormi, ĉar la impreso de la frosta antaŭa nokto restis kiel inkubsonĝo ĉe niaj memoroj.

Post nokta frosttremado, sabato estiĝis. Matene, la loka grupo disponigis al ni sian sidejon, kaj okazis la ĝenerala kunsido de HEJS (jam ni diris ke ĝi ne povos okazi dum la nacia kongreso, ĉar tiu ĉi koincidos kun la IJK en Fredericia). Dum la kunsido, oni informis la membrojn pri la nuna situacio de HEJS, oni legis la jarraporton senditan al HEF kaj TEJO, kaj estis prezento de la ĉefaj punktoj el la projekto de Regularo sendita por aprobo al HEF-estraro.

Alia sufiĉe interesa temo estis la financa raporto. En foresto de la kasisto, ŝajnis ne sufiĉe klara la ekonomia situacio, sed estas neprafakto la neebleco de pluvivo per la nuna 100-pe-seta kotizo. Tial, oni aprobis kiel venontjara kotizon 150 ptojn, kun la peto de bonvola 200-pe-seta pago. Eksterlandanoj, pro afrankkostoj, de nun devos pagi 200.

Ni parolis ankaŭ pri la aktivado de la delegitoj, laborprogramo, kaj starigo de la HEJS-gastiga Servo, kies aliĝilon vi ricevas kune kun tiu ĉi numero. Bedaŭrinde, jam finiĝis la ĉi-jara kampanjo de Pasporta Servo de TEJO. Venontjare, tamen, ĝi povos enkadriĝi ene de la tutmonda.

Finiĝis la kunveno per voĉdonado pri la venontjara tendara urbo. Du urboj kandidatigis: Madrid kaj Santander. Oni elektis tiun ĉi lastan. Do, en 1976 espereble okazos la 2^a HEJS-tendaro dum la Paska Semajno, kaj ĝi estos pli bone organizita, ĉar la organizonto, nia vicprezidanto Miguel Gutiérrez, loĝas en tiu urbo. Ne okazis

la samo ĉi-jare, ĉar oni organizis tiun ĉi tendaron el nia sidejo, Bilbao. Tial "organizo" iĝis improvizo.

Vespere, je la 7^a, la zaragoza grupo malavare regalas nin, eĉ tiagrade, ke poste ni ne bezonis vespermanĝi. Ni krome devas danki la grandan honoron kiun ni havis: ni subskribis en la ora libro de la grupo. Ĝis nun, tia honoro estis rezervita por eksterlandaj samideanoj. Poste, pro troa kosto de la dancejoj, la balo ne okazis. Do, disa vagado tra la urbo kondukis kelkajn al... la stacia trinkejo.

Dimanĉe, jam nenio okazis krom la fotado de la partoprenantoj kaj la reciprokaj adiaŭoj.

Resume, tre pozitiva estis tiu ĉi sperto, ĉar ĝi vere utilis por plifortigi nian sektion; iom post iom, ni esperas ke ĝi iĝos pli kaj pli serioza kaj multnombra.

Nur ion ne tro agrablan mi devas aldoni: la homoj, eble pro manko de vera programo, ne sufiĉe interkonatiĝis, restante en preskaŭ fermitaj grupoj. Tio estas nepre evitenda ĉefe en movado universalisma kia la nia. Male, surprize, estis, ke Esperanto estis aŭskultata pli ofte ol esperite. Ja nia nivelo estis pli alta ol tiu de la krokodilaj naciaj kongresoj. Sed, ankoraŭ restas laboro...

Fine, ni devas esprimi niajn plej elkorajn dankojn al la zaragozaj gesamideanoj, kiuj tiel varme akceptis kaj helpis nin, kaj speciale al S-ro Ortiz Gratal, HEF-estranano, kiu kunlaboris por organizado de la ekskurso kaj loĝado.

Nu, ni renkontiĝos venontjare en Santander, ĉu ne?

NOTOJ —

(Red.) —

• Niaj aktivaj geamikoj de la madrida Liceo disponas pri stoko da bonkvalitaj ĉemizoj sur kiuj montriĝas la verda stelo kaj la vortoj: "Esperanto Internacia Lingvo". Se vi deziras aĉeti, mendu ĉe Madrida Esperanto-Liceo, Hortaleza 31-2^o MADRID 4

- Granda nombro da esperantaj aranĝoj okazos ĉi-jare en Hungarujo kaj Pollando. Se vi deziras konkretajn informojn, bv. peti ilin al ni.

4^a

IVO lapenna



UNUECO

Por kiu ajn organizo ege gravas esti unuecaj, Ĉar estas la plej simpla sistemo por fortikigi sin mem, sed por movado kunliganta tiom da homoj tiel diferencaj pro karaktero, edukado, ideologio, ..., unueco estas esenca baza kondiĉo por ĝia normala disvolvado.

D-ro LAPENNA estis dum multaj jaroj elstara aktivo de la internacia Esperanto-movado kaj liaj organizaj lecionoj fariĝis bazo por multaj poresperantaj agantoj. Kvankam li tuŝis la demandon pri unueco iom spora-de, tamen mi klopodos analizi lian ideon pri tio.

Dum la 43-a Universala Kongreso (UK), okazinta en Mainz (1958), kaj kadre de la Jubilea Festprogramo pro la 50-a datreveno de la fondiĝo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), D-ro Lapenna parolis pri "La rolo de UEA en la estonteco". Tiam li diris: "Se ni estas unuecaj, kvankam ne tre multnombraj, ni povas altrudi nian starpunkton al la mondo. Ni bezonas ankoraŭ pli grandan unuecon de konvinko pri la ĝusteco de nia vojo, unuecon de agado sur tiu ĝusta vojo, unuecon en la observado de la faritaj decidoj."

"Ni nur bezonas saĝon kaj prudenton por esti unuecaj", estis vortoj de D-ro Lapenna dum la Festparolado de la 49-a UK en Hago. Sed, laŭ ŝajne, tiuj aliaj vortoj pli komplete esprimas lian tiaman vidpunkton: "ni unuiĝu sente kaj pense ankoraŭ pli firme en nia UEA por povi laborante en konkordo kaj helpante unu la alian svinge antaŭenpuŝi la ideon de komuna lingvo kaj konsiderinde vastigi la aplikon de Esperanto en la praktiko."

Elektioj alproksimiĝis kaj D-ro Lapenna aperigis artikolon en "Esperanto" pri "La senco de la nunaj elektoj" (1969). Tiam, laŭ ŝajne, li definitive fiksis sian vidpunkton pri unueco: "Unueco en diverseco estas la baza principo, el kiu sekvas la tuta organiza strukturo de UEA."

En alia artikolo en "Esperanto", okaze de plia fortikiĝo de UEA en 1971, li esprimis la devizon: "Unueco estas forto", sub kiu ekmarŝis UEA post la kunfandiĝo en 1947.

Kiel novjara mesaĝo li skribis artikolon "Unueco super ĉio" (1974). Tie li esprimas ke "efektive, necesis krei unuecon en diverseco" jam de la kunfandiĝo. "La diversecoj kaj malsamecoj en la Esperanto-Movado estas el multaj vidpunktoj preskaŭ tiel senfinaj, kiel la varieco en la mondo, kies parto ĝi estas. La praktikantoj de la Internacia Lingvo apartenas al diversaj rasoj, nacioj kaj malpli grandaj etnaj grupoj kun propraj kulturoj kaj civilizacioj. En la Esperanto-Movado estas reprezentitaj en pli aŭ malpli alta grado ĉiuj klasoj, sociaj tavoloj, profesioj kaj okupoj kun propraj specialaj interesoj. El vidpunkto de edukiteco la diferencoj ne estas malpli grandaj. Tia estas la realaĵo kaj tia varieco estas per si mem pozitiva. Sed restas la fakto, ke la skizitaj grandaj diferencoj prezentiĝas kiel obstaklo nepre venkenda, se temas pri organizita agado postulanta maksimuman unuecon por plua disvastigo de la lingvo. Vid-al-vide de tiuj malsamecoj troviĝas du faktoroj de unueco. Malgraŭ la multflanka diverseco, malgraŭ ĉiuj diferencoj kaj naciaj kaj sociaj kaj ideologiaj, la Esperanto-kolektivon kunligas ne nur la lingvo kiel tia, sed samtempe, eĉ pli signife, ĝia objekte internacia karaktero kaj la fekunda funkcio, kiun ĝi estas vokita plenumi en la fluado direktita al universaleco." Krome, li ankaŭ skribis ke "unueco certe ne estas celo al si mem. Forta UEA, unueca en diversecoj, kun multnombra membraro estas necesa kaj el vidpunkto de prestiĝo, kaj el tiu de praktika utiligo de la lingvo."

Ĉar tiu ĉi lasta artikolo klarigas, pli bone ol mi povus resumi, lian ideon pri unueco, mi rezignas tion fari. Tamen, restas al mi ankoraŭ analizi kelkajn ideojn aŭ faktojn pli malpli ligitaj al unueco, kvankam li esprimis ankoraŭfoje pri tio: "Unuecon limigas diverseco ekzistanta en la realo, kaj diversecon mildigas la postulato de unueco."

Iam, dum lia festparolado en Hago, okaze de la

49-a UK (1964), D-ro Lapenna ripetis vortojn diritajn de D-ro Zamenhof dum sia lasta kongresa parolado, en 1912, dum la 8-a UK en Krakovo: "Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉian en plena unueco, en ordo kaj konkordo... Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni, per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune..." Kaj, verŝajne, li intence elektis ankaŭ vortojn de tiu konata parolado de nia iniciatinto por sia eksigo: "Kiam Zamenhof pro similaj kaŭzoj estis devigita retiriĝi en Krakovo, li diris: 'Vi ne plu vidos min antaŭ vi, vi vidos min inter vi.' Mi ne faros kiel Zamenhof, ĉar, kvankam mi admiras lian naturon, mi havas alian naturon kaj mi ne hontas pro mia alia naturo. Mi do ne diras al vi: 'Vi ne plu vidos min antaŭ vi.' Mi ne diros, ke vi vidos min inter vi, sed mi diras al vi: Koran dankon kaj adiaŭ por ĉiam!"

Se ni atente tralegas liajn esprimitajn vidpunktojn, ne eblas kompreni la eksigon de D-ro Lapenna. Ĉar se ni devas "observi decidojn, formitaj laŭ la principo de plimulto", kaj se ni "bezonas unuecon en la observado de la faritaj decidoj", kaj se ni ligas lin al ĉiuj gravaj iniciatoj kaj atingoj de UEA kaj la Esperanto-Movado en la lastaj jardekoj, tiam ni devas akcepti lian respondecon rilate la Statuton de UEA, cetere aprobita de la Komitato. Per ĝisnuna reprezenta demokratio la Landaj Asocioj (LA) havas troajn rajtojn (vd., ekzemple, art. 43: LA voĉdonas grupe nome de asociaj kaj de individuaj membroj); li ja konstatis tion en siaj lastaj artikoloj: "okaze de la sekva revizio de la Statuto necesos doni al la individuaj membroj pli adekvatan reprezentigon" kaj ankaŭ li pledis por "plia demokratigo por vastigo de la rajtoj de individuaj membroj." Sed, ĝuste la LA-j kun pli da asociaj membroj havas ne tiom da individuaj membroj, kvankam tamen havas plian reprezentigon en la Komitato.

Ankaŭ, mi opinias ke, se 622 ĉefdelegitoj kaj delegitoj voĉdonis por li en la lastaj elektoj por Ko-

mitatanoj B "per grandega plimulto" kaj se, post lia adiaŭa parolado dum la hamburga UK (1974), "super la tondra aplaŭdado daŭre aŭdiĝis: Ni volas Lapenna! Lapenna kun ni!...", ĉio ĉi signifis gravan apogon de la individua membraro. Tial, laŭ mia opinio, li devis 'demokrate observi tiun decidon, formita laŭ la principo de plimulto', ĉar per lia neakceptado la idearo falas per si mem. Mi esperas ke D-ro Ivo LAPENNA re-konsideru sian eksigon kaj agu laŭ siaj esprimitaj elpensoj, tiel ke la individua membraro de UEA, reala subtenanto de ties organizo, havu adekvatajn reprezentigon kaj rajtojn.

JUAN AZCUÉNAGA

Hejs : ree cindrulino

Lastatempe aperis unu el tiuj epokfaraj verkoj en kaj pri nia Lingvo: Esperanto en perspektivo: fakttoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo, enhavante ĉion sciindan pri ĝia movado.

Sed, KIE estas nia HEJS? Mi serĉis sciigojn pri la hispana movado, precipe junulara; kaj HEJS? En la informo, laŭ ŝajne sendita de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), ne aperas mencio pri ekzisto de junulara sekcio (15.2.14). Kiam pritraktas la hodiaŭansituacion de la ĉefaj landaj organoj (10.2.2), kvankam aperas tiuj de aliaj TEJO-sekcioj, ne estas mencio pri tiu de HEJS, malgraŭ konstanta mencio en la jarraportoj de TEJO. Dum la 14-a IJK en Hamburg (FR Germanio) aliĝis al TEJO la hispana sekcio (17.3.2); ĉar tiu kunveno okazis en la jaro 1958 kaj la fondon de HEJS akceptis HEF en 1959, dum la XXa Nacia Kongreso, tio ŝajne signifas ke la fondiĝo de HEJS okazis en 1958, kvankam la formala akcepto ne estis ĝis la jaro 1959, kaj verŝajne la unua HEJS-bulteno ankaŭ aperis en 1958.

Kaj nenion plu mi trovas pri HEJS. El tio naskiĝas la demando kiu kulpas pri tio? Ĉu HEF, ĉu informmanko flanke de HEJS, ĉu ...; kiu, do?

JUAN AZCUÉNAGA

7^a FRANCA - HISPANA

RENKONTIĜO

Ci-jare, Huesca estis la urbo gastiganta la Renkontiĝon. La belega pejzaĝo de la provinco estis la unua allogaĵo kiu kaptis nian atenton.

Cetere, la urbo, malgranda, kvazaŭ vilaĝo, donis al la kunveno familiecan etoson en kiu la aranĝo glate disvolviĝis.

Pri la ĉeesto, kiel tradicie, la plimulton en la partoprenantaro konsistigis la grupanoj de Zaragoza kaj Bilbao, kiuj alveturis Huesca'n en propraj aŭtobusoj. Kelkaj francaj gesamideanoj kiuj tradicie partoprenas la Renkontiĝon, mankis ĉi-foje, sed ĝoje oni devas rimarkigi la ĉeeston de belaj ĵus komencintaj lernantinoj el Pau, kiuj, kun ankoraŭ ne sufiĉa lernotempo, bezonis franclingvan alparolon, kiun la subskribinto tre pene atingis (tamen, ili ankaŭ komprenas aŭ parol(et)as la hispanan). Ni esperas ke venontjare ili povos kun plena scipovo ĝui esperantan etoson.

Rilate al la organizado, mi povas diri ke estis tiu ĉi la plej bona Renkontiĝo de mi ĉeestita. Ĉio estis trafe kaj bonege programita. Kiel eroj, estas menciindaj la ekskursoj al Alquézar kaj la kastelo de Loarre, la vizito de la urbo kaj la muzeo, kaj la varma akcepto en la urbodomo. Apartan mencion meritas la lingve altnivela meso celebrita de I. Casanoves, kaj la hispanlingva prelego pri esperanto de S-ro. Fernando de Liego, post enkonduko kaj prezento de S-ro. Miguel Sancho Izquierdo.

La loka radio kaj ĵurnalo taŭge diskonigis nian kunvenon. Ni esperas ke venontjare tie povos kreiĝi nova grupo por nia movado.

Resume, krom la sabat-dimanĉa pluvo (neevitebla en ekskursoj de la Bilbaŭa grupo) ĉio estis perfekta kaj imitinda en venontaj Renkontiĝoj. La VIII^a Franca-Hispana Renkontiĝo okazos en Lourdes. Mi sincere konsilas al vi ĝin ĉeesti.


(Red.)

P
O
E
Z
I
A

Iam
iun tagon
eble posttagmeze
foren mi foriros
mi forlasos
vin
ĉion
ĉiujn
vi tiam
ĉiuj restu ĝojaj
ĉar tia estis mia deziro lasta
ĉiu posedo necerta
ĉiu iluzia trankvilo
iĝos certa kaj neiluzia
finfine mi formetos
la manojn de ĉio
tutan vivon
mi batalis en necerteco
kaj ne-daŭreco
ja foreniri
estos mia lasta
malavareco
do tiam mi iĝos
floro
sunsubiro
ĉielarko
herbo
vermo
ĉio

t
r
u
o

A
r
k
u
s
B
u
k
i
s



43-a internacia foiro
de barcelono 3-a-12-a junio 1975



Denove, jam por la 17^a jaro, la Internacia Foiro de Barcelono uzas esperanton por sia reklamado.

Krome, ene de la Foiro, HISPANA ESPERANTO-INSTITUTO havos standon kiel informojn pri la Internacia Lingvo, por la 9.^a fojo.



Jen la plimulto el la partoprenintoj en la 1.^a HEJS-tendaro.